

# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 20 1952 Decembro

PRI NI MEM.

La komenco de ĉi artikolo kaŭzis al mi iom da malfacilaĵo. Por solvi la problemon mi komencis ĝin per la fino.

Grandpaŝe alproksimiĝas la vintro, la falinta neĝo elokvente atestas pri tio. La vintro kaj siaj longaj vesperoj, frostoj kaj aliaj nedolĉaj specialaĵoj. Por ni esperantistoj, la vintro ne estas la periodo de ripozo. Kontraŭe, ĝi estas la sezono de seninterompa okupado, kunvenoj, kursoj, propagandaj vesperoj.

Same kiel la antaŭaj jaroj, oni avida atendis la grandan nombron da novaj lernantoj (fonto de estontaj adeptoj). Kaj, same kiel la antaŭaj jaroj, oni estas kvazaŭ seniluziigita pro la relative malgranda nombro da novaj gekursanoj.

Preskaŭ ĉiam; oni tiokaze aŭdas la voĉon de malkontentuloj. Oni protestas, serĉas kaŭzon kaj neofte emas kulpigi la eksterstarantan mondon. Evidantoj de partio, sindikato kaj precipe la gazetoj ricevas la grandan parton de la kaŭzoj malbenindaj.

Kamarado, kiu jam de longe observadas la ĝeneralan sintenon de niaj propraj gemembroj, povas konstati ke preskaŭ ĉiam la plej novaj membroj, lamentadas plej laŭte.

Tiel estis antaŭ tiom da jaroj kaj tiel estas ankoraŭ nun. Nove kiel artikuloj tre ofte estas tro fanatikemaj kaj nemalofte, tro fanatikaj adeptoj rapide laciĝas kaj fariĝas indiferentaj.

Eĉ forlasis la movadon. Kaj la bilanco resumigas je malprofito anstataŭ ol profitiga saldo. Ĉiokaze ili riskis infekti pli fidelajn elementojn aŭ kaŭzi malesperon ĉe pli malnovaj membroj.

Pro kio ili komencis la studadon de la lingvo estas kaj restas nesolvebla problemo kaj estas por ili pura tempoperdon. Supozante ke ili vere venis kun la celo internaciigi la esperanto koncepto, tiam ili perfidis la ideon riproĉante al aliaj, fremdaj al nia movado, personoj, sian propran kulpon.

Ĝisnunmorente la esperantistoj devis helpi sin mem kaj anstataŭ ol ricevi kaj atendi eksteran helpon, ili konstante devas batali kontraŭ la malica kontraŭularo tiom potenca kaj multnombra. Konsiderante tion, kaj analizante la nunan situacion laŭ tutmonda skalo, la esperantistoj povas fieri pri la atingitaj rezultatoj. La despota sinmovo de la publiko, la okazintaj militoj kaj politikaj baroj ni progresis senĉese. Kaj honore ni rememoras la profetajn versaĵojn de nia majstro :

"ni dankas la venton, kaj repurigitaj, ni forton pli "  
"freŝan akiras."

Do for la balasto kaj ĉiuj bonvolemluloj al la laboro :

Ce la bazo de nia laboro devas regi vera samideaneco kaj interkonsento. Plane kaj metode oni devas organizi



la kunlaboron ŝparante la fortojn kaj ne forperdi neutilan laboron. Oni devas esplori la plej efikplenajn sistemojn por rikolti plej profitajn sukcesojn. Intertempe oni daŭrigu la personan propagandon inter amikoj kaj konatuloj. La grupaj kunvenoj estu ne nur agrablaj sed samtempe lernigaj. La harfendemulo prokrastu sian nefastan influon.

Nia organizo estu sendifekta, ĉiu postemulo plenumu akurata sian laboron.

Ankaŭ niaj devoj je aliaj instancoj ni prizorgu. Ekzemple, la kotizon por SAT estu pagata en oportuna tempo. La gekamaradoj kiuj ne rekte pagas al K-do Basteels, pagu al K-do Fortiers antaŭ la 20a de Decembro. P.O. 401064. La kotizo estas 80 fr. por membroj, 86 por novaliĝantoj. Eventuale + 25 fr. por tiuj kiuj deziras la broŝureton "Sennacieca Revuo"

De nun, ĉiu estu akurata ĉe la plenumado de siaj devoj, kondiĉo nepre nevesa, por la bona funkciado de iu ajn organizo.

Theo.

NE FORGESU LA DUSENCECON !

Karaj gekamaradoj, mi havas la neenviindan devon plenumi malagrablan taskon. Mi ĉiam prokrastis la aferon kun la espero ke ĉio solviĝus post iom da tempo. Tamen tio ne okazis...

Sed jen la faktoj :

Mi apartenas al tiuj kiuj iniciatis la monatajn intergrupajn kunvenojn. Kvankam mi ĉeestis ilin nur malofte, mi ĝojis pro la sukceso, kiun ili havis kaj havas ankoraŭ, ĉar antaŭe la grupaj kunvenoj suferis pro anemio.

El tiuj monataj kunvenoj kreskis la ideon varbi inter la Naturamikoj, ĉar tie troviĝas vasta laborkampo. Kaj efektive ni trovis tie novajn adeptojn, ne nur en la ĉirkaŭaĵo de Antverpeno, sed ankaŭ en aliaj regionoj de la lando.

Sed kio okazis ?

Uzante principe la rimedojn kiujn la Naturamika Movado disponigis al ni, la rezulto estis ke la novuloj preskaŭ ĉiuj estas Naturamikoj. Kaj la ĉefa spirito kiu regas nuntempe la monatajn kunvenojn estas Natura amo. Mi eĉ devas diri ke la lastkreitaj kernoj : Tilrijk, Hoboken, Merkssem, Schoten, Boom, Kessel-Lo, Leuven, estas nuraj Naturamikaj sekcioj, t.e. ke ili ĉiel dependas de la Federacio de la Laboristoj Esperantistoj.

Tamen la "Informilo" pritraktas tiujn sekciojn kiel "niajn" grupojn .

Mi persone ne maltrankviliĝas pri tio. Mi aktivas por Esperanto en la Naturamika Movado por servi ambaŭ ideojn. Krome mi estas F.L.E.ano. Sed mi devas atenti la altajn instancojn de la N.A. Prave aŭ malprave, ili timas ke ni kreas movadon en movado, kaj ili avertis nin pri tio. Ni jam spertis malagrablaĵojn pro la kunveno en Merkssem. Krome estas Naturamikoj Esperantistaj, ne nur ĉe ni sed ankaŭ en aliaj landoj, kiuj samopinias kiel la N.A.-instancoj, kaj kiuj ne volas kunlabori al la disvastigo de Esperanto en sia movado, se ni ne forlasas nian "dusencon" taskon.

Fine, kaj tio estas la plej grava stumbligajo, oni antaŭmetis al ni la jenan problemon :

La Naturamikoj klopodas teni la kotizon por siaj membroj kiel eble plej malalta. Aliflanke ili aŭdis ke dum la monataj kunvenoj oni demandis por F.L.E.kotizon, kiu pli ol duoble superas tiun de la N.A. Rilate al tio, oni rakontis al ni historion, veran aŭ malveran, de kamarado kiu ne plu povis pagi la du kotizojn (de FLE kaj de N.A.) li ekŝiĝis kiel membro de la N.A. kaj pagis sian kotizon al FLE. El tio sekvis riproĉoj al nia adreso kaj oni rigardas nian aktivecon kun malfido. Mi agnoskas ke mi komprenas la vidpunkto de la N.A.

Ni devas traradi tiun dusencecon. Ni estu FLE.anoj aŭ Naturamikoj, ĉar finfine ni staros antaŭ nevenkebla situacio. Ĉiu sekcio preparolu la aferon kaj dum la venonta kunveno oni diskutu ĝin por alveni al neta solvo.

K-do J. Beeckmans

LA PROKSIMA MONATKUNVENO OKAZOS EN "DE HERTOG" LA 12an DE DECEMBRO. SE VI SATAS KOLBASĜANON VENITU J. BONTE ANTAŬ LA 8/12 PREZO PROKS. 10 Fr.



# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lanorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 21 1953 Januaro

=====  
= LA ESTELANO DE =  
= LA ANTVERPENAN DISTRIKTO DE F.L.E. =  
= DEZIRAS AL VI =  
= FELICAN KAJ PROSPERAN NOVJARON . =  
=====

## PROTOKOLO PRI LA INTERGRUPA KUNVENO DE LA 21a DE NOVEMBRO EN MILRIJK .

Senkulpigante la prezidanton Willekens, K-do Van Eynde malfermas la bone ĉeestatan kunvenon (membroj el kvar sekcioj kaj pluraj novaj lernantoj).

Pase oni mencias la venontjaran kongreson de TANEF en Innsbrück kaj ankaŭ la bedaŭrindan malsukceson de la novaj Esperantokursoj kaj de la perfektiga kurso. Tamen la malĝojiga impreso de tiu sciigo estas rapide forviŝita per la vigla parolado de k-do Van Eynde, pri lia vojaĝo al la U.E.A. kongreso en Oslo, el kiu denove montriĝis la efikeco de Esperanto.

Efektive K-do Van Eynde per sia klara rakontado partoprenigas nin al siaj travivaĵoj. Kun li, ni laŭ Kopenhago, Helsingoer kaj pramsipe al Helsingbörg, veturas al la sveda Goeteborg, vagas tra la urbo, ekskursas kaj vizitas la "Svenska Kögellager" kaj grandan ŝipkonstruejon.

Ni ĝuas la svedon kaj norvegan naturbelecon, konatiĝas kun Oslo kaj admiras en la popoldizeo la famajn "Viking" ŝipojn, la polusan ŝipon de Fridjoff Hansen kaj la "Kontiki" fluson. Ege interesas nin la vizito al la fabrikejo de peza akvo kaj al la arĝent-minejo en Köngsborg. Ni ĉeestas distran vesperon kun ŝarado gvidita de F.Sailagyi; iras al la kongresa balo kaj aŭskultas la paroladon de la urbestro - en unu vorto plene partoprenas la kongresajn tagojn kaj spertas la kongresan atmosferon, kulminantan en la rezolucio.

Sukcesplena filmo kun Esperanto-teksto montras la ravajn pejzaĝojn de la norda lando de montoj kaj akvofaloj, tiel ilustrante kaj konkludante la interesan paroladon.

En deĉembro ni renkontiĝos en Deurne por festi la datrevenon de la Zamenhofa naskiĝtago, kaj ni esperas revidi vin tie.

La raportistino.  
Stella De Weerd.



PROTOKOLO PRI LA INTERGRUPA KUNVENO DE LA 19a DE DECEMBRO 1952a

EN DEURNE.

Kiam ni ( + 22 ) kunvenas en Deurne la 19an de decembro, atendas nin tie denove agrabla surprizo. Efektive, malfermante la kunvenon kun kelkaj vortoj pri la naskiĝtago de Doktoro Zamenhof, K-do Bonte montras al ni aparaton kiu registras la sonojn.

Unuj post la aliaj, la ĉeestantoj parolas kelkajn frazojn aŭ kantas strofojn ; la aparato poste reaŭdigas tiujn parolojn kaj kantojn, tial ebligante al ĉiuj, aŭskulti la propran voĉon, kiu plej ofte strange frapas la propran orelon : kurioza fenomeno.

Je la naŭa, la varmaj frandaĵoj kolbaŝ- kaj pompanoj alvenas kaj kun la bongusta kafe ili silentigas la ĉeestantaron; ĉiuj gustumas la ŝatatan regalon.

Poste K-de Bonte organizas parolatan konkurson : la partoprenantoj parolu dum du minutojn seninterrompe ; la aparato faciligos al ni juĝi la rezultaton. La prezidanto kiel unua konkursanto pritraktas nian internacian lingvon; k-do Mortiers parolas pri sia kurso kaj pri la antaŭhieraba vizito de germana ŝipoficiro; k-do Van Eynde rakontas kiel li iĝis Esperantisto kaj sekvis franc-esperantan kurson en Sclessin ; k-do Beeckmans admonas la komencantojn sekvi sian ekzemplon kaj kapti aŭdace ĉiun okazon por sin ekzerci en esperanta parolado; kuraĝulo jam tuj faras tion kaj pravas la vortojn de sia antaŭulo. Premio rekompencis la partoprenantojn.

Tro frue ni devas adiaŭi. Ĝis la priksima jaro en Hoboken.

La protokolantino.

Stella De Weerd.

=====  
+ + + + +  
NIA PROPSINA MONATKUNVENO OKAZOS  
MARDON, LA 13an DE JANUARO EN HOBOCKENO EN LA POPOLDOMO  
LA 8a VESPERE  
+ + + + +

La estraranoj de foras la entrarkunvenon  
Jardon, la 15an de Januaro, je la 8a vespero en la oficejo de  
K-do Van Eynde - Domo de la Laboro - Poliklinstrato

La grupo de Deurne sciigis ke, ek de Januaro la kunvenoj en  
"De Hertog" okazos ĉiun mercredon anstataŭ la vendredo .

Jus aperis :

"LA KONSILANTO " pri la Esperanta Gramatiko  
de G.J.Degenkamp

Ni povas ankoraŭ liveri kelkajn , de ni , antaŭmenditajn  
ekzemplerojn, je la prezo de Frs.27,50 anstataŭ la oficiala  
prezo de Frs.37,50

Cu vi jam prunteprenis librojn el nia libroŝranko ?

Vidu la liston de niaj libroj en la anekso de la aprila numero  
de la Informilo



# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 22 1953 februaro

1952 - 1953.

Ce la jarfino oni ĝenerale aspiras la novan jaron kvazaŭ ĝi certe estos pli prospera kaj pli bona ol la forpasinta.

Ĉar ni estas nur simplaj estaĵoj ni evidente kaj logike ĉion atendas de la estonto. La espero ĉion vivigas.

La pasinta tempo estas perdita por ĉiaj bonaj intencoj kaj esperoj sed...la estonto nur donos rekompencan por estinte farita laboro. Kiu ne semis, ne povas esperi rikolton.

Konsekvence estas saĝa ideo ke oni faru, ĉe la jaroŝanĝo/retroanalisan rigardon! Konscia samideano esploru sian konsciencan kaj faru al si la demandon ĉu efektive li faris ĉion eblan por la movado kaj por si mem. Ne sufiĉas ke oni pagu regule sian kotizon. Oni ankaŭ devas aktivigi t.e. plenumi iun taskon, kaj tiurilate oni povas ne sufiĉe substreki la efikon de la persona propagando. Ĝi vere havas netakseblan valoron.

Nia kerno reprezentas sufiĉe gravan kernon kaj nombron da membroj. Se ĉiuj kunlaboris fervore sur la persona tereno, oni baldaŭ ekvidus la rezultatojn.

Dum la pasinta jaro, ni bone laboris kaj almenaŭ pli bone ol la antaŭa jaro. Sed parolante denove pri nia konscienco ni tamen devas konfesi ke ni estas ne tute trankvilaj. Certa periodo dum kiu ni neglektis la movadon, lasas kvazaŭ makulon malagrablan.

Tio okazas al ni ĉiuj. La peko tamen estas pardonebla se ni firme intencas estonte uzi la tempon pli bone kaj pli utile por ni mem kaj pli profitige por la movado. Ni regrupiĝis antaŭ nelonge, oni denove alportos reformojn se necesas.

Ĉiuj senescepte ni devas perfektigi nin en la lingvo. Ne nur la gramatiko sed precipe la praktika uzado de la lingvo devas esti nia konstanta pricerbumado.

En tiu strebado la malnovuloj staras apud la novuloj kun bonvolo kaj fervoro ĉar ili fieras alporti sian parton en la granda belega idealo "Por la lingvobarojn".

Por la perdita tempo. Vivu la nova jaro kiu devas permesi al ni atingi la celon libere elektitan "Esti veraj sennaciistoj".

Ni deziras al ĉiuj niaj membroj ĉion bonan kaj multe da progreso sur la lingva tereno.

Theo.



PROKOKOLO PRI LA ĜENERALA KUNVENO DE LA 13a DE JANUARO 1953a

EN HOBOKEN.

Proksimume 22 gekuraĝuloj maltimis la vintran veteron kaj sidiĝas apud la kraketanta fajro.

Post enkonduko de K-do Spitaels ĉiuj prenas skribilon kaj ekŝiĝas la spritaĵon kiel subtekston por la helkoloraj bildoj kiujn oni transdonas. Ne estas ĉiam facile elpensi ion ridigan sed la legado de la trovaĵoj montras ke inter ni estas bonaj rimarkantoj kaj humoraĵistoj.

K-do Somers laŭtlege leteron kiun li ricevis el germanio kaj kiu celas la formadon de ĉeno de vidaĵkartoj inter la interesuloj.

Bonvena trinkaĵo regalias la ĉeestantojn.

Post iom da komunikado kaj babilado la unua kunveno en 1953a jam apartenas al la pasinteco. La dua, kun iomete administra karaktero, okazos en Antverpeno kaj ni esperas ke vi multope ĉeestos.

La protokolantino.

Stella De Weerd.

=====

U R Ĝ A A L V O K O

Niaj amikoj scias ke la Esperantistoj-Naturamikoj aranĝos internacian kunvenon dum tiu ĉi somero en Innsbrück (Austrio).

La dato jam nun estas riksita kaj ĉiu preparu do por la semajno de la 17a ĝis la 25a de julio proksima.

La forveturo okazos la vendredon 16an de julio malfrue vespere en Centra Stacidomo kaj la reveturo, dimanĉon la 26an de julio, alveno en Antverpeno lundon la 27an de julio.

Oni rezervis por ni, krom la kutiman kampterenon, 60 litojn, kondiĉe evidente ke oni sufiĉe frue enskribu.

La prezo por la vagonarveturado Antverpeno - Innsbrück iri kaj reveni estas proks. Frs. 960,--. La kostoj por pasparto ne enkalkulitaj.

La prezo por la tranoktado estas tre malmultekosta. Kaj tiu kiu en esperanto rondo deziras pasigi agrablan libere-tempon en rava ĉirkaŭaĵo nepre profitu la okazon.

La amatoroj tuj sin anoncu al la Sekretario de la Naturamikoj, K-do Fr. Van den Tyngaert, Eikenlei 151, Hoboken, kiu volonte donos ĉiujn pliajn informojn.

=====

=====

LA SEKVONTA KUNVENO POR LA ANTVERPENAJ GRUPOJ OKAZOS  
MĖRKREDON, LA 11an DE FEBRUARO, JE LA 20a  
EN LA SALONO DE LA NATURAMIKOJ, FRANKRIJKLEI 39

=====



# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 23 1953 marto

## PRI INNSBRUCK.

Innsbruck, la ĉefurbo de Tirolo havas proksimume 100.000 enloĝantojn. Ĝi estas malnova urbo kaj nomiĝis Ad Oenum, Cenipons aŭ Cenipontum (Ponto trans la Inn). Jam en 1187a ĝi estis konata sub ĝia nuna nomo.

Kun Igls tiu-ĉi urbo estas la turista centro de Tirolo. Tie oni povas admiri multajn vidindaĵojn kaj artaĵojn: Preĝejo kun la tombo de imperiestro Maksimiliano ĉirkaŭita de dudek ok bronzaĵaj statuoj, skulptitaj en pli ol ordinara grandeco. La "Goldene Dachl" mezepokaj domoj, kun multaj pentrindaj subjektoj. La Maria-Theresia-strato kun Anna-kolono, Palaco Taxis, Triumpfordo, Monto "Isel", konata el la Tirola liberig milito en 1819a, kun Andreas-Hofer monumento kaj diversaj muzeoj. Panoramo de la batalo apud la monto "Isel" (kiel en Waterloo apud Bruselo), Bestparko, birddomo, k.t.p.

La alpurbo Innsbruck kun ĝia intensa urba vivo estas ĉirkaŭata per imponaj altmontoj. Per la Nordkettenbahn oni iras al Hungerburg (900 metroj) kaj Seegrube (1.900 metroj). La Nordkettenbahn, vagonaro nomata "tandrabahn" (plimalmultigo por Naturamikoj) montas tre kruta.

Venante en Hungersburg oni veturas per "ŝvebvagono" al Hafelekar - 2.434 metroj da alteco. Tie la montaro estas kovrita de neĝo. La panoramo estas belega kun ĝia 300 altaĵoj kaj mal-supre la urbo, duonkaŝita.

Estas ankaŭ bonaj kafejoj en Innsbruck. Ekzemple sur la sepa etaĝo de la "Hochhaus" kun belega panoramo. Tie oni dancas la "Schuhplattler" kaj aliaj naciaj dancoj, oni kantas, oni jodlas kaj oni povas aŭskulti Tirolmuzikon.

Cent kilometroj da vojoj aŭ vojetoj kondukas tra la belega kaj pitoreska ĉirkaŭaĵo, kaj sur la montoj ĝis 2.580 metroj da alteco, kiel la Brandjoch.

Innsbruck estas ankaŭ famkonata centro por skiamatoroj.

M. Lemmens.

. . . . .

## LA VOJAGO DE LA ESPERANTISTOJ-NATURAMIKOJ AL INNSBRUCK

K-do Van den Wijngaert jam enskribis pli ol 50 kun-vojaĝantoj por Innsbruck. Se li atingos la nombrunde 50 la vojaĝkostoj plimalmultigos por ĉiuj.

Se estas ankoraŭ amatoroj por la semajno de la 17a ĝis la 25a de julio ke ili sin anoncu tre baldaŭ ĉe k-do Van den Wijngaert, Eikenlei 151, Hoboken.



PROKOKOLO PRI LA GENERALA KUNVENO DE LA 11a DE FEBRUARO 1953a

EN ANTVERPENO.

La nombro de ĉeestantoj (11) kiuj kunvenis la 11an de februaro en Frankrijklei estis neordinare malgranda ; verŝajne kaŭze de la tramstriko.

Post malfermo de la kunveno, la prezidanto Willekens iomete skizas la vivon de la movado dum la pasinta jaro : ĝi bedaŭrinde ne troviĝas en brila situacio. Malkreskanta nombro de gelernantoj montriĝas ĉie , kvankam la unuagrada kurso de K-do Mortiers estas sukceso, por la duagrada kurso oni ĉiam atendas la interesulojn al kiuj ni nur povas rekomendi ĝin.

Oni mencias la kunvenon pri la interrilatoj kun la Nuturamikoj en Pelikaanstraat, kie , oni vane atendis la kamaradojn Beeckmans aŭ Van Sitteren.

Kelkajn detalojn pri la vojaĝo al Innsbrück donas la hobokenaj kamaradoj.

La proksima kunveno estos la jarkunveno de F.L.E. kun reelekto de la estraro kaj la diversaj raporto de la sekretario, kasisto kaj bibliotekisto, ĝi denove okazos en Antverpeno.

La duan parton de la vespero K-do Mortiers kaj liaj gelernantoj pruvas la taŭgecon de nia lernolibro : "Facile lerni Esperanton " kiu de la komenco jam paroligas la gelernantojn. K-do Mortiers komentas sian instrumentodon kaj la bonajn rezultatojn kiujn li tiel akiras kaj li ankaŭ mencias la kazon de kamarado kiu sekvis antaŭe kurson en alia grupo kaj kiu atestis ke dum la unua leciono en Frankrijklei li jam parolis pli ol dum la tuta antaŭa lernojaro.

Generala interbabilado pri ĉies spertoj kun la diversaj gekorespondantoj, finas la kunvenon.

La protokolantino.  
Stella De Weerd.

=====

Merkredon

la 11ande Marto 1953a okazos la jarkunveno de la F.L.E. Esperantista Laboristaro Antverpena, en Frankrijklei 39 je la 8a vespere.

T A G O R D O .

- 1.- Je la 8e vespere la Prezidanto malfermos la kunvenon.
- 2.- Raporto de la Sekretario
- 3.- Raporto de la Kasisto
- 4.- Raporto de la Bibliotekisto.
- 5.- Reelekto de la Estraro.

La ekŝigantoj estas : Prezidanto : K-do Willekens E.

Sekretario : K-do Bonte J.

Kasisto : K-do Bovoy J.

2a sekretario:K-do De Groof J.

Bibliotekisto:K-do De Bie F.

Gazet-Servo : K-do Van Eynde R.

Ekspozicio-Materialo : ~~K-do Van Lancker~~

Festorganizanto: K-do De Block E.

Protokolanto : K-do Mortiers T.

6.- Kotizo

7.- Informilo

8.- Diversaĵoj.

=====

*Informilo S.F.D.W.  
Migraĵo - 180mm.  
Kaj kunvenaj notoj.*

*konkato, de la informilo!*

*10.-  
februaro - konkato!  
De Weerd.*



# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 24 1953 aprilo

PRĪ LA VETERO .

=====  
Ĉe la komenco de la monato de aprilo ni esperas ke la nova monato havigos al ni tiel bonan veteron kiel ni ĝuis dum la monato de Marto. La bona vetero en niaj regionoj estas ne abunda.

Nia klimato estas vere ŝancelema. Neniam oni estas certa pri la morgaŭa tago. Tre ofte oni aŭdas ne sendundan lamentadojn flanke de la popolo sed vole, nevole, ni devas submetiĝi al la veteraj kapricoj.

Sed estas ne nur la klimato kiu estas ŝancelema. Tiu sama fenomeno estas natura konstato ĉe aliaj organizoj, ĉu naturaj, ĉu faritaj.

Eĉ nia propra movado ĝis nun ne sukcesis venki tiun fakton.

Jam en antaŭa artikolo mi asertis ke Esperanto ĉiam progresas nehaltigeble, spite ĉiuj kontraŭuloj, skeptikuloj kaj skismuloj. Se krizo ekestas en ia loko, alialoke granda progreso komencas kaj la disvastigo evoluas seninterrompe.

Post pluvo, la ĉielo heliĝas kaj pli brilaj sunradioj vokas kaj logas al nova vivo kaj laboremo. Ili varmigas niajn korojn kaj freŝa sindono ĉie montriĝas. Kunvenoj estas ĉeestataj pli multnombre, ekskursoj kaj renkontiĝoj okazas kaj ĉesenteble kaptas nin al pli arda fervoro kaj aferemo.

Nia organiza formo estu kaj restu la bazo de nia orda, interkonsenta kaj bone definita laborado. Niaj devoj, kaj principe la financajn, oni ne forgesu. Mi ĉefe celas la kotizon. Nur sana financa situacio povas garantii sukcesplenan rezulton. Mi do donas ĉi tie la poŝtĉekkonton de nia kasisto por tiuj kamaradoj kiuj, pro iu ajn kaŭzo, ne pagis sian kotizajon.

27.90.38 J. BOVOY, Antwerpen

Por eviti estontajn diferencojn inter la distrikta kaso kaj niaj devoj rilate al la estraro oni pagu minimume po tri monatoj.

Por la progresemluloj ni ankaŭ devas rememori ke ili ĉiam povas ĉeesti lernigajn vesperojn Merkrede en Frankrijklei.

Ankaŭ ni pripensu la partoprenon en la manifestacio de la 1a de Majo. Inter familianoj kaj konatuloj, ni propagandu por ke ili ekmarŝu malantaŭ la verdo standardo. Ju pli multnombraj ni estas despli efikplene ni propagandas kaj estu certa ke tiu propagando havas sian netakseblan valoron.

Antaŭ ol fini, mi revenas ĉe la titolo de la artikolo dirante al vi ke ni ĉiam povas plibonigi la klimaton de nia propra movado se ni nur volas !

Theo.

=====  
LA SEK/ONTA F.L.E. KUNVENO OKAZOS MERMERKREDON, LA 15an DE APRILO JE LA 20a EN "DE HERTOOG" HERENTALSEBAAN 251 DEURNE  
=====



PROKOKOLO PRI LA ĜENERALA KUNVENO DE LA 11a DE MARTO EN ANTVERPENO

La 11an de marto okazis en la salono de la Frankrijklei la Ĵar-kunveno de la Laborista Esperantistaro Antverpena, grupo de F.L.E.-anoj el la antverpena ĉirkaŭaĵo.

Je la kvarono post la oka la prezidanto Willekens malfermas la kunvenon per kelkaj enkondukaj vortoj, li dankas la N.A.-estraron pro la ĉiama afabla disponigo de la kunveno kaj senkulpigas K-don Van Bynde kiu estas malhelpata ĉeesti.

La prezidanto tuj pritrakta la malagrablajojn kiujn ni spertis lastatempe en la interrilatojn kun kelkaj membroj-naturamikoj pri kiuj atestas: 1) la artikolo de kdo Beckmans en nia Informilo de decembro 1952a

2) la cirkulero enfaldita en nia lasta Informilo.

Li ege bedaŭras ke la redaktoro ne sciigis la estraron pri tiuj apeloj kaj avertas ke se similaj agoj ree devus okazi ne plu estos eble al li kunlabori al la Informilo.

Al K-do Somers kiu demandas informojn pri la organizado de la Lab.Esp.-movado, k-do Mortiers respondas klarigante unue pri S.A.T. kiu estas tutmonda per-esp.organizo de la klasbatala laboristaro, due pri la L.E.A.-oj, kiel nia Asocio, kiu propagandas la lingvon en ĉiuj medioj de la laborista movado kie la okazo sin prezentas. Tiel estis ke ni donas esp.kurson ankaŭ en Nat.Amikarondo. Nia aliĝo al F.L.E. disponigas al la laboristaj esp. riĉan propagand-kaj stud-materialon kiu plejeble efikas en la propagando por la lingvo.

Oni povas sin demandi ĉu la iniciativo kiun prenis kelkaj naturamikoj fondi propran esp.-rondon estas feliĉa ago. La lab.esp.istaro jam ne estas tro granda kaj dividi ĝin en ankoraŭ pli granda nombro da grupoj ŝajnas neoportuna.

Al tio K-do Bonte respondas ke estante membro de F.L.E. kaj samtempe de la N.A. li troviĝas inter du seĝoj; li bonintence aperigis la artikolojn ĉar li esperis tiel instigi al interparolado. Plue li rimarkigas ke se li ĉiam devus preparoli la aperigon de iu artikolo, kun la estraro, la regula apero de la informilo ne estus ebla.

Bovoy aludas la diversajn kursojn, ekzemple en Instituto Em. Vander Velde, ĉe la poŝtistoj k.c.kaj li substrekas ke ni organizus kursojn ankaŭ aliloke, ekzemple en fakorganizoj se la okazo prezntiĝus. Ĉu oni pro tio povus riproĉi al FLE intermiksadon en la internaj aferoj de tiuj grupoj? Tre certe ke ne.

La prezidanto konkludas tiun diskuton esperante ke post tiuj klarigoj ĉiu opa membro konkludos laŭ propra konscienco kaj ke tiaj malagrablajoj estonte ne plu okazu.

Ni nun aŭskultas la raporton de la sekretario kiu koncize skizas nian grupan vivon depost la regrupiĝo la 6an de Novembro 1951a. Membro-oscilado, grup-kunvenoj, partopreno al la 1a de Majo sekvantaro, EKI-prelejo kaj renkontigo de la N.A. en Kessel-Lo estas menciitaj same kiel la kursoj ĉe la N.A., la regula aperado de la Interkontaktilo ktp.

Post dankvorto al K-do Bonte por lia senlaca laboro kaj al la aliaj kunlaborantoj, la prezidanto ree alvokas la membrojn laŭvice verki artikolon por la Informilo.

La financa raporto, kies ciferojn estos kontrolataj de 2 membroj, montras dificiton 366,- Fr.rezultanta el la neregula pagado de la kotizo. La kasisto Kdo Bovoy insistas por ke la sekcioj reguligu tiujn kontojn. La kotizo sufiĉas, kondiĉe ke ĝi estu regule pagata.

La bibliotekista raporto de K-do De Bie vidigas ke ankoraŭ ĉiam la libroj estas tro malmulte prunteprenataj, ni pripensu la efikecon de la legado kaj profitu la okazon (ankaŭ en la publika popoliblioteko)

La estraranoj daŭrigos sian funkcion, ni notas Kdon Mortiers kiel konsilanton kaj kinon De Weerd kiel protokolantinon.

Ankoraŭ kelkaj diversajoj estas preparolataj:

1) eventuala disponigo de propahandmaterialo por ekspozicio de la N.A. en "Zoo". Konsentata. 2) responde al artikoloj pri esp. en "S.O.S." gazeto de Deurnaj gelernantoj. Oni sendos cirkulerojn de la FLE-gazetarservo. 3) la sekretario demandas informojn pri la en Lab. Esperantisto menciita debito de Flandrio. Ĉar neniu povas lin respondi oni informos en Amsterdam. 4) FLE-anoj estonte ĝuos rabaton ĉe aĉetado de libroj.

Jam estas la duono post la deka kiam fermante la kunsidon, la prezidanto avertas ke la proksima monata kunveno okazos en Deurne, la 15an de Aprilo.

St. De Weerd

SEKVANTARO LA DE MAJO: NI KUNVENOS FRANKRIJKLEI, ANTAŬ LA PREĜEJO DE LA JEZUITOJ. JE LA 10a KAJ KVARONO.



# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lanorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 26 1953 Junio

BELAJ KANTOJ . . . . .  
=====

Belaj kantoj ne daŭras longtempe, diras flandra proverbo, kaj ni povis denove sperti ke ĝi entenas multe da vero.

Depost kiam estiĝis la pli intima kunlaborado de la laborista esperantistaro de la Antverpena ĉirkaŭaĵo, ni havis la kutimon, kiel montriĝas el la protokoloj regule aperintaj en nia Informilo, iri laŭvice al la kunvenejoj de la diversaj grupoj.

La vizitataj kamaradoj ĉiam zorgis ĉu porlierniga, ĉu distra, ĉu amuza vesperoj, ĉiu laŭ siaj lokaj eblecoj kaj ni certe havis ankaŭ en propra tempo la oficialajn kunvenojn kie la grupa vivo kaj la administraj punktoj estis diskutitaj.

En iu antaŭa skribaĵo mi akcentis la neceson de tiuj kunvenoj kaj la bonan efikon kiun ili havas sur nia movado.

Antaŭe la membroj ĝenerale restis en sia propra medio sciante nenion, aŭ preskaŭ, pri tio kio okazas en la aliaj lokoj.

Nun laŭ nia ambulanta maniero oni renkontas unu la alian ĉiumonate, oni pli intime interkontaktiĝas kaj ni havas la okazon kompari niajn proprajn lingvajn konojn kun tiuj de la aliaj kamaradoj kaj lerni el la spertoj de ili.

Sed lastatempe ni devis kun bedaŭra konstati ke tiu bona kutimo endanĝeriĝas.

Ni aŭdas pri grupoj kiuj ne plu kunvenas, pri kursoj kiuj fiaskis, aŭ preskaŭ, pri membroj kiuj perdas la bonan kutimon pagi regule sian kotizon, kiu tamen ne estas tro alta.

Ni rememoras al la promesplena kunveno kiun ni havis lastatempe en Merksemo kun tiom da (ŝajne) entuziasmaj kamaradoj, sed kien ni ne havis la okazon iri duan fojon ĝis nun.

Kaj konsiderante ĉiujn tiujn faktojn ni multe timas ke la bela kanto jam estas finkantita....

Kamaradoj, tio ne devas esti.

Se la grupa vivo malplivigliĝas, se la entuziasmo en iuj lokoj ŝajne jam malaperis, sufiĉas de unu aŭ de du fervoruloj, de kelkaj laboremaj kamaradoj por ke baldaŭ nova vivo ekfloru.

Estas al tiu konvinkitaj kamaradoj ke mi faras urĝan alvokon. Mi kalkulas je ilia kunlaborado por ke nia movado konu des pli grandajn progresojn.

Prez.

=====  
LA SEKVONTA INTERGRUPA KUNVENO OKAZOS EN WILRIJK  
MARDON, LA 16an DE JUNIO  
JE LA 20a HORO. EN LA POPOLDOMO, HEISTRAAT 6  
=====



PROKOKOLO PRI LA ĜENERALA KUNVENO DE LA 15a DE APRILO 1953a  
EN DEURNE.

Dekses membroj ĉeestis la ĝeneralan kunvenon en Deurne, krom ili nur unu el Hoboken kaj unu el Wilrijk.

Ni povas konstati ke la movado ne estas ege vigla; nepre necesas ke ni streĉu ĉiujn fortojn por iomete aktivigi la anaron.

La prezidanto Willekens laŭtlegas paragrafon el "Het hoekje van de Esperantist" de la "De Natuurvriend", pri la kunveno okazinta en Deurne, kaj atentigas je la ĉiujara renkontiĝo en Kessel-Lo la 20an-21an de junio kaj la vojaĝo al Innsbrück. Li ree insistas por ke laŭvice iu membro el la diversaj grupoj verku ĉefartikolon por la informilo.

Menciante la favoran artikolon pri Esperanto, rilate la decidon de UNESKO, aperitan en "Le Peuple", li transdonas eltranĉon por la arĥivo.

Pri la pasiva Wilrijka grupo raportas k-do Wolfs. La rimedoj por reveki la intereson estas pritraktataj, same kiel la obleco plej baldaŭ organizi ĝeneralan kunvenon en Wilrijk.

Kun ĉiuj ni ŝatas de K-do Bonte ke la Esperanto-stando en la ekspozicio organizita de S.V.V. havis kontentigan rezulton: vendado de libroj, steloj ktp. aliflanke aĉetado de 6 Schildhof's (malnova eldono akirebla je malnova prezo). Ankaŭ parolado ĉe la "Jong Socialist" estis projektata.

La Naturamikoj disponigos al la Esperantistoj malgrandan angulon en sia jubilea ekspozicio en "Zoo". Ni bezonas taŭgan surskribon, kiu santepe estu konciza kaj efika. Por respondi eventualajn informpetojn staru ĉe la stando du kamaradoj deĵorantaj proksimume 2 aŭ 3 horojn. Ankaŭ gvidontaj por akompani la esperantistajn eksterlandanojn tra la urbo, donu sian nomon.

La pentekostaj tagoj metas je nia dispono grandan propagandoblecon, kiun ni fande uzu. La volontuloj de grandnombre sin anoncu, kaj en la venonta kunveno en Hoboken tio-ĉi estos definitive preparolata. Kun firma lasta alvoko por ĉeesti la k-majan sekvantaron finiĝas ĉi-tiu kunveno.

PROKOKOLO PRI LA ĜENERALA KUNVENO DE LA 12a DE MAJO EN HOBOKEN.

La 12an de majo denove renkontiĝis en Hoboken la laborista esperantistaro. Enirante la kunvenejon ni tuj rimarkes la blankajn skribpapecojn kuŝantaj sur la tabloj kaj prave konkludas ke la kunveniginto postulos de la ĉeestantoj ian cerban streĉadon. Efektive li diktas al ni tri frazarojn kaj per elĉerpado de la taŭga vorto el ĉiu frazo de la respektivaj serioj ni kompilu tri proverb-ojn. Estante sufiĉe oftuzataj, tiuj ĉi ne estas malfacile troveblaj kaj multaj ĝustaj solvoj rezultas.

Poste Ko De Block laŭtlegas kelkajn versaĵojn kies tekstoj ege amuzigas la aŭskultantojn. Ankaŭ pri la spritaj anekdotoj rakontitaj de diversaj kamaradoj, la ĉeestantoj bone ŝidas. Antaŭ ol komenciĝas la dua parto de la vespero sekvas kelkaj sciigoj:

- 1) En Wilrijk estos organizota la proksima kunveno. La malnovaj Wilrijkaj konatuloj ricevos specialan invitilon.
- 2) Ko Bonte sciigis ke en la N.A. ekspozicio en Zoo al Esperanto oni disponigis nur etan angulon. La N.A. mem prizorgos ĉiun bezonatan. (ankaŭ rilate la gvidistojn)
- 3) Pri Boom kaj Willebroek ni esperas ekscii pliajn informojn pere de Ko Mortiers kiu kontaktis kun la tiuj kam-adoj la 1a de majo.
- 4) Ĉiu esp. estas instigata ĉeesti la prelegon de Dro Lapenna.

Sekvas nun la dua parto de la programo: la montrado de kelkaj filmoj, esperantlingve komentataj de Hobokena kamarado. Unue ni pli konatiĝas kun la nin gastiganta antaŭurbo Hoboken kaj pli speciale kun la lastaj tie organizitaj plibonigoj sub sociala vidpunkto. La dua filmo kondukas nin suden en nia lando kie ni liber-tempas kun N.A. grupo dum ĝia vojaĝo al la Hoëgne kaj ĉirkaŭaĵo.

Post danko kaj ferma vortoj de la prezidanto ni adiaŭas, kontentaj pri la vespero en Esperanta rondo.

St. De Weerd.



# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 27 1953 Julio

## PROTOKOLO PRI LA PRELEGVESPERO DE LA 22-5-1953

"La Perspektivoj de Esperanto en la nuna monda Situacio".

-Dro I. Lapenna .

"Infanmemoroj el Siberio"

-S-ino Ljuba Lapenna.

La 22an de majo Esperanto Komitato Intergrupa (EKI) organizis kiel antaŭludon al la Beneluksa Esperanto Kongreso, prelegvesperon en la salono "De Witte Leeuw".

Proksimume cent da personoj (membroj el la diversaj antverpenaj E-grupoj kaj eĉ kelkaj eksterurbanoj) plenigis la kunvenejon, kiam je kvarono antaŭ la 21a alvenas Dro Ivo LAPENNA kun sia edzino, la eminentaj geprelegistoj, varme aplaudataj de la ĉeestantoj.

En la enkondukantaj vortoj, la prezidanto de EKI rimarkigas ke Antverpeno ĉi tiun semajnfino troviĝas sub la signo de Esperanto. Ne nur okazos tie ĉi, tiu kongreso laŭ nova koncepto, la B.E.K., sed flanke de tiu pure esperanta okazantaĵo ankaŭ kongresos en la sama urbo la Natur-Amikoj inter kiuj multaj estas esperantistoj, kaj en kies jubilea libreto ni trovas esperantan alparolon de la urbestro. S-o Jaumotte tuj transdonas la parolvicon al S-ino LAPENNA.

Petita anstataŭi S-on Solzbacher, S-ino Lapenna, decidis rakonti pri sia naskiĝlando, Siberio, lando de mallibereco, kie la junuloj senhezite mortis por siaj idealoj, kie la revolucio flamis.

Per agrabla, belsona voĉo, ŝi pitoreske revokas bildon de tiu lando, kie vintre ĉe temperaturo de 30 ĝis 40 gradoj sub nulo, la infanoj ĝuas la blankan malvarmecon ĉe neĝ- kaj glaciludado. Ni ja vidas antaŭ ni la bonkoran larganiman loĝantaron, envolvitan en manteloj kun peltoj kaj peltĉapoj, post troika promenado tra la arbare aŭ post teatrovizito, returni al la hejma paradizo, kie seninterrompe zumzumas la samovaro, por prepari la ĉiam ŝatatan teon. Ni sentas la ĝojon en la aero, alportitan de la mirinda printempo, kiam brue disrompiĝas la rivero. Somere ni kunadmiras la popoldansojn, gustas la konfitaĵojn. Kun ŝi ni travivas la revoluciajn tagojn, forlasas tiun fertilan regionon, vojaĝis laŭ Moskvo, urbo de ĉiuj Rusoj, al Jugoslavio, kie la vortoj kvankam ofte samsonoj kun la rusaj, ne havas la saman signifon kaj kie la konceptoj pri vojaĝado kaj vestado estas tute aliaj ol en sia naskiĝlando.

Per ŝia ĉarma rakonto ni konatiĝas kun tute diferenca aspekto de tiu lando, kiun ni ĝis nun nur konis kiel landon de frostoj. Ni vere aprobas la vortojn de S-o Jaumotte, kiu kore dankante la prelegistaron, atentigas ke speciale Esperanto, tiu rekta interkomunikilo, ebligas tiun intiman interkonatiĝon.

La kelkajn paŭzmomentojn S-o Jaumotte profitas por saluti konatajn esperantistojn i.a. s-oj Van Gindertaelan, Kempeneers, Roose, Jacobs, ktp. Li urĝe insistas por ke estu redakta listo de ĉiuj grupoj el la antverpena sirklaĵo por ke EKI povu ankoraŭ pli bone funkcii.

Post tiu paŭzeto, D-ro LAPENNA tuj komencas sian prelegon "La Perspektivoj de Esperanto en la nuna monda Situacio".



Estas necese, li diras, de tempo al tempo analizi la situacion por trovi la kazojn de sukceso aŭ malsukceso kaj la vojon sekvendan.

La problemo prezentas :

1-e eksteran, de la esperantistoj ne influeblan aspekton,  
kaj 2-e internan aspekton.

La ekstera aspekto mem dividiĝas en

a) pure lingva flanko : multaj lingvistikistoj nur strukture observas la taŭgecon de Esperanto, abstraktante de ĝi ĝian socialan rolon ; ili eĉ foje kuragas ĵugi nian lingvon sen scipovi ĝin kaj tute ne konsideras ke ĝi socie enradikiĝis.

b) socia flanko : la parolantoj de sama lingvo sentas sin apartenantaj al lingvo komunajo, kaj ne konsiderante la malsimilajn kutimojn, ili antaŭ ĉio konscias pri sia homa estaĵo.

c) politika flanko (malgraŭ la neŭtraleco) : la solidariga rolo de Esperanto ĉiam estas kontraŭbatalata de la potencoj kiuj ne deziras la efektivigon de tiu homara unueco. Sed malgraŭ malfacilaĵoj, malfavorado kaj malpermeso, multaj esperantistoj en tiuj landoj de kontraŭstaro persistas en kuraga laboro por la komuna afero.

Kvankam la eksteraj cirkonstancoj en tiu ĉi tempo en grandaj partoj de la mondo estas malfavoraj, ni ne malesperu ; la evoluo iras al unueco kaj ni laboru des pli por la disvastigado de nia lingvo.

Pritraktante la internan aspekton, D-ro Lapenna admonas certajn esperantistojn, kiuj malkontentaj pri la maldiligenta progreso, foje mem subfosas la movadon. Ni pripensu ke venkigi Esperanton, ne estas tiel facila sed konsideru la jam gravan resulton atingitan (kreado de literaturo, lernolibroj en 84 lingvoj, radio-elsendoj ktp.) kaj fieru pri tio. En nia koro ni sentu la necesan entuziasmon, ne nur pensu sed ankaŭ agu konsekvence.

Resume li deklaras ke en ĉi tiu situacio, malbona ekstera sed kontentiga interna, per niaj propraj fortoj ni multe povas atingi i.a. per

a) informado de la larĝa publiko, speciale de tiuj medioj kiuj laŭ propra celo intencas homocan ideon.

b) organizado de novaj kursoj por regenerado de niaj vicoj.

c) bona organizo de la societaj renkontiĝoj, por ke niaj mondoj fariĝu veraj fajrujoj de intensa kultura vivo.

Estas tute certe ke ni normale marŝos antaŭen, kaj nia lingvo estonte pli kaj pli uzata, atingos ankoraŭ pli grandan valoron tiel laŭ teknika, kiel laŭ ideala vidpunkto.

Jen la konkludo de la fajra parolado de D-ro Lapenna, pro kiu S-ro Jaumotte ege dankas lin, esprimante la deziron ke tiu parolado estu por ĉiuj instigo al pli vigla kaj intensa Esperanto-vivo.

S-ro Jaumotte adresas kelkajn nederlandlingvajn vortojn al la ĉeestantaj gekomencantoj ; li atentigas ke nombro da originalaj verkoj de D-ro Lapenna estas je dispono. (ELE akiras ekzempleron de "Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo" por la biblioteko).

Per konvinke kantata "La Espero" finiĝas ĉi tiu interesplena vespero.

La protekolantino,  
Stella De Weerd.

=====  
LA SEKVONTA INTERGRUPA KUNVENO OKAZOS  
MERKREDON ; LA 15an DE JULIO  
EN ANTVERPENON ; FRANKRIJKLEI 39 , JE LA 8a VESPERE  
=====



# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 28 1953 Aŭgusto

## PROTOKOLO PRI LA ĜENERALA KUNVENO DE LA 16a DE JUNIO EN WILRIJK.

La ĉi monata ĝenerala kunveno okazis la 16an en Wilrijk, kun la celo iomete priparoli la restarigon de la tiea disfalinta grupo. Krom la loka kursgvidanto kaj ties anstataŭanto troviĝis inter la 20-opa ĉeestantaro 5 Wilrijkanoj, kunvokitaj per speciala invitilo.

La prezidanto Willekens aludas la ĉefartikolon en la lasta informilo kaj substrekas la neceson vigligi la movadon.

Kvankam ni staras antaŭ la someraj libertempmonatoj ni jam nun devas pristudi tiun problemon por celkonscie eklabori en septembro. Se en iu loko la nombro de la regule kunvenantaj grupanoj malkreskas ni ne devas malinteresi je tiu grupo. Ni ĉiam klopodu disvastigi Esperanton inter la laboristoj en kiu ajn medio. La ĉefa afero estas instigi ilin al lernado de la lingvo; se poste ili volas aliĝi al FIE des pli bone, tio tamen ne estas deviga, nur konsilinda por daŭre resti en kontakto kun la movado.

K-do Van Eynde kiu jam antaŭe komentaris la trijaran kluban vivon de la Wilrijka grupo, konfirmas ke li estas ĉiam preta gvidi kurson kaj ankaŭ lia anstataŭanto, kies kapablecon li alte taksas, volas ĉiam helpi; ĉefe estas ke la gelnantoj klopodu regule ĉeesti. Ni do esperas ke en septembro kun nova entuziasmo komenciĝu kurso kaj kunvenoj.

Ĉi okaze la prezidanto Willekens faras ankaŭ alvokon al tiuj kama-  
radoj kiuj perfektigaĝas en la lingvo por ke ankaŭ ili ekgvidu kurson.

Kelkaj ĉeestantoj protokolas pri la interesaj Esperantaj vesperoj organizitaj de EKI (prelegoj de gesinjoroj Lapenna - akcepto de finnaj vizitantoj). Pli intensa kunlaborado kun EKI estos pristudata en estrarkunveno.

Iaste la prezidanto sciigas ka nia sekretario ricevis leteron de la FIE-estraro, proponanta okazigi en 1955 la FIE kongreson en Antverpeno.

Ni funde cerbumu pri tiu propono kaj ĉiuj ĝiaj postuloj; ni estu konsciaj ke tiam ni devas apelacii al ĉiu esperantisto por ke li kunhelpu kaj plenumu sian taskon. Sendube estos oportuna okazo kiu povos efike influu la lokan movadon.

En julio ni renkontiĝos en ĝenerala kunveno en Frankrijklei; la tiam libertempantojn ni senkulpigos, la aliajn certe atendas.

St. De Weerd.

=====  
PROTOKOLO PRI LA ESTRARKUNVENO DE LA 29a DE JUNIO 1953a.

Ĉeestas la kunvenon: delegitoj de ĉiuj grupoj, krom unu kiu estas senkulpigata.

La unua punkto de la tagordo: La Flandra Distrikto - estas enkondukita de la Prezidanto. Li klarigas ke kaŭze de la ĉesigo de ĉiu esp. vivo en Flandrio, krom en la Provinco Antverpeno kaj la fakto ke la kotizo de la Flandra Distrikto ne plu estas pagata depost tre longa tempo, tiu Distrikto ne plu havas ian tujan utilan celon.

El la diskutado montriĝas unuanime ke la restarigo de la Flandra Distrikto almenaŭ en la nuna stadio de nia movado ne sin altrudas sed ke oni prefere plivivigu la rilatojn kun la grupoj de nia Provinco.



oni komisiis la sekretarion fari la necesajn elpaŝojn.

La prezidanto laŭtlegas kelkajn sciigojn el la lastaperinta "Interkontaktilo" pri internaj administraj aferoj.

Oni sekve pritraktas la kromkotizon de la lastokazinta Kongreso. Ĉiuj samopiniis ke ne eblas, almenaŭ por la momento, altigi la grupan kotizon. La propono de la kasisito ke la prupa kaso pagu tiun kromkotizon por tiu-ĉi jaro estas akceptata. Je la fino de la jaro la afero estos de nove pridiskutata, precipe en rilato kun la Progresanto.

La temo EKI vekas sufiĉe viglan diskutadon. Ekzistis antaŭe pli malpli regulan intergrupan kontakton inter la diversaj Antverpenaj Esperanto Grupoj, sed tio datumas de antaŭ la milito. Sen iu antaŭa interkonsento oni simple invitas nian membrojn al tiel nomataj EKI-kunvenoj. La kunveno bedaŭras tiujn agadmanierojn kaj opinias ke, se ia kunlaborado de la Antverpenaj Esperantogrupoj estas rekomendinda, devas ekzisti aliaj manieroj por tion efektivigi.

La kunveno decidis repreni post la ferioj la diskuton pri la neceso kaj ebleco organizi esp.vesperojn, tiaj kiaj okazis lastatempe, kaj la organizon de novaj elementaj kaj duagradaĵ kursoj, post kiam la prezidanto fernas la kunsidon.

=====

IMPRESOJ PRI VESPERO INTER FINNAJ ESPERANTISTOJ.

La duan semajnfinojn post Pentekosto, grupo da Finnoj inter kiuj multaj esperantistoj, travojaĝantaj Belgion al Francio, restadis en Antverpeno.

Jam duntage sabaton kaj dimanĉon, lokaj geesperantistoj gvidis la eksterlandanojn tra nia urbo kaj kune vizitis i.a. la Plantin-muzeon. Dimanĉ-vesperon estis antaŭvidita renkontiĝo en la finna marista hejmo, kie la Finnoj kantis esperantajn kaj naciajn kantojn.

Je la oka multaj interesuloj jam kolektiĝis en tiu domo sed pro la grandnombra ĉeestado kaj la torura bruo kaŭzita de la kermeso, oni proponis iri al "De Witte Leeuw".

Post konsumado de taso da bongusta kafe kun kuko, ni do rapidiris al tiu salono. Tie pli facile oni povis interkonatiĝi kun la vizitantoj. Kelkaj inter ili nur krom la gepatra scipovis iomete la francan aŭ la germanan lingvon, sed pluraj parolis Esperanton.

Malfermante la kantregalon S-ro Jacobs, honore al la gastoj, kantis esperantlingve "La patrolando" la finnan nacian himnon. Al tio respondantis la eksterlanda grupo per nia nacia himno, ankaŭ esperantlingve kaj kvarvoĉe. Neniam antaŭe la Belgoj aŭdis sian himnon tiel bele sonanta. Sambele unu kanto sekvis alian, kelkaj esperantaj, aliaj Finnaj. Por igi ilin plene ĝueblaj, la grupestro, sperta esperantisto, antaŭe tradukis kaj komentariis la tekstojn. Speciale menciindaj estis la kanto de Sibelius kun vortoj de la fama finna verkisto "Kivi", kaj nia komuna himno "La Espero". Kun intereso kaj granda plezuro ni aŭskultis la kantadon de la finna ĥoro kies virinoj estis pitoreske vestitaj en helkoloraj naciaj kostumoj.

Ankaŭ la Antverpenanoj aŭdigis siajn voĉojn sed la rezulto estis nekomparebla. Tro rapide la tempo por disiri alproksimiĝis. Donacante kelkajn belajn librojn pri Finnlando kaj kore dankante la gastigantojn, la grupestro esprimis sian ĝojon ke pere de Esperanto li povis organizi sian vojaĝon kiu ĝis nun jam pli bone sukcesis ol li atendis, dank'al laŭreciproka rekta kontakto inter la, iam fremdaj, samlingvaj homoj. Ĝi certe efike impresas pri la taŭgeco de nia internacia lingvo kaj estos ankaŭ en la hejmlando belega propagandilo por montri kiel Esperanto malformas la animojn de la popoloj unuj al la aliaj.

Ankaŭ ni plene samopiniis kun la diritaj vortoj kaj ne povis ne danki pro la bela vespero kaj deziri al la Finnoj sukcesplenan vojaĝdaŭrigon.

Stella De Weerd.

+ + + + +

LA SEKVONTA INTERGRUPA KUNVENO OKAZOS EN DEURNE, MĈKREDON LA 16an de SEPTEMBRO JE LA 20a HORO, en "DE FERTOG" HERENTALSSEBAAN 251 DEURNE

Jatdon, la 5an de Septembro Estrarkunveno je la 20a en Mercatorstraat 8e K-do Willekens



# INFORMILO

Interkontaktilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lamorinièrèstraat 10 Antverpeno  
Numero 29 1953 Septembro--Oktobro

## MI CEESTIS SAT - KONGRESON .

Kiam ekkonatiĝinte kun la Esperanto-movado mi aŭskultis kamaradojn rakonti pri iliaj kongresmemoroj, mi ĉiam demandis al mi "Ĉu ili ne iom troigas?". Nun, mem partopreninte la 26an SAT-kongreson, mi scias ke neniam vortoj sufiĉas por priskribi la veran karakteron de SAT-kongreso; persone oni devas sperti la spiritostaton kiu regas tiajn kongresojn por tion kompreni.

Eble ĉi tiu kongreso pli intense ankoraŭ ol la antaŭaj spiris tiun specialan atmosferon ĉar en Wortley Hall la kongresanoj vere kunvivis dum tuta semajno sub unu tegmento, en granda rondo familia. Estas en similaj renkontiĝoj ke Esperanto plene pravigas sin, kiam perdante la nacian karakterizon ĝiaj uzantoj, 185 el 8 landoj en ĉi tiu kazo, sen ia malfacilaĵo daŭre povis interkonatiĝi. Ne nur dum la tiucela interfratiĝvespero sed jam frumatene en la dormĉambroj (inter miaj dormkunulinoj estis 2 francaj, 2 anglaj kaj unu sveda), dum ĉiu manĝo, ĉe komuna laboro tiel ĉe ŝvitiga purigado de vojeto en la ĝardeno (memoraĵo de nia restado) kiel ĉe gaja helpado al la manĝilarlavado, efikis nia komuna lingvo por estigi tiun rektan kamaradecan kontakton.

Al mi tre plaĉis la kongresejo, Wortley Hall, tiu vasta domo kun unuflanke la postsignoj de la grafa restadejo (eĉ la buldoko elvokis la antaŭan dommastron) kaj aliflanke la atestoj pri sukcesa man- en manlaboro kiu igis ĝin centro de socialista strabado. Inter kunsidoj kaj prelegoj, la partoprenintoj en ĝia parko kaj dank'al ĝia favora situo meze de verdaĵoj kun larĝa vido sur la pejzaĝo, volonte ĝuis la kamparan freŝan aeron. Kamarado Williams kun la gehelpantoj mirige prizorgis ĉiam akurate la manĝojn je ĉies kontentigo.

En sindona laboro la gekamaradoj de la L.K.K. organizis vizitojn kaj ekskursojn ege interesajn. Ekzemple en la paperfabriko, kiun mi vizitis, diversaj gvidistoj montris al la grupetoj la tutan procedon de fabrikado, aldonante klarigojn kaj detalojn pri la laborkondiĉoj, konklude oni regalis nin en la fabrikmanĝejo per taso da teo kun kukoj.

Se la utilo de Esperanto montriĝis dum tiu rondirado same tiel dum la vizito al la kaverno en Castleton kaj dum ĉiuj niaj ekskursoj, kiam unuopa traduko de la lokaj gvidistparoloj sufiĉis por bone informi la diverslingvajn vizitantojn (kia diferenco kun la kripligitaj gvidistklarigoj, kiujn mi, flandra enloĝantino ricevis en malkorekta franca lingvo de angla gvidisto ĉe londona ekskurso), ĝia vera taŭgeco ĝi pruvis dum laborkunsidoj kaj prelegoj mem. Ili respegulis la realiĝon de la peresperanta laboro de SAT.

La interesplenajn prelegojn sekvis demandoj kaj rimarkoj, kiujn pro la limigita tempo, la preleginto plejofte nur mallonge povis respondi per kelkaj aldonaj vortoj, tamen formante kelkfoje mem prelegeton kiel ekzemple la sciindaĵoj pri Islando kiujn kamarado Vajsblum aldonis. Certe por la aŭskultintoj la pritraktitaj subjektoj estas instigo al interŝanĝo de opinioj, al plia enprofundiĝo de la temo. Tiurilate mi opinias, ke la peto ke kamarado Bartelmes aperigu la prelegon pri "Racio kaj Mistiko", esprimis ĉies deziron. Ankaŭ el la malfacilaĵo ne ekdebatu dum



la interesa "Ni demandu" - kiam kamarado Sulski kun sia kvaropo da britaj SAT-anoj informis nin pri la Brita Laborista Movado, montriĝis la aktiva intereso de la ĉeestantaro.

Ne malpli pensigaj kaj cerbumigaj estis la laborkunsidoj kun la viglaj debatoj al kiuj multaj, eĉ junaj, kamaradoj partoprenis. Esperanto ne estas distraĵo, nek nur rimedo kiu faciligas la komercajn kaj turismajn interrilatojn. Oni sentis ke la SAT-anoj en la pridiskutado de la proponoj kaj sugestoj penas pere de Esperanto forigi la regantajn malbonaĵojn kaj celas al starigo de tute nova mondo, celo kiu fakte estis la impulso kondukinte al la kreado de nia lingvo.

Tiu, por mi unua kongreso havigis al mi etan ekkomprenon pri diversaj demandoj; la prenitaj notoj ebligas ankoraŭ plian enpenetradon. Vere la kongreso provizis min per koncentrita studmaterialo por la interkongresa periodo. Jes, interkongresa periodo, ĉar mi memoras la vortojn de iu kongresano "finiĝas la kongreso sed mi jam preparas min al la sekvonta", kaj estas ankaŭ mia konvinko ke ni vivu de unu kongreso al alia, kaj la plej bona deziro kiun mi povas esprimi al kamarado estas ke ankaŭ li, povu ĉeesti kongreson.

Stella De Weerd,

=====
PROTOKOLO PRI LA ĜENERALA KUNVENO DE LA 15a DE JULIO 1953a

-----
EN ANTVERPENO.
-----

Finante la protokolon de la antaŭa ĝenerala kunveno per la vortoj: "...la tiam libertempantojn ni senkulpigis..." ni ja ne antaŭvidis ke tio necesus en tia grado: la julian kunvenon ĉeestus nur 9 gekamaradoj.

Speciala programo ne estis ellaborita sed ni aŭskultis la rimarkojn de kelkaj kamaradoj koncerne la propagandon kaj la diversajn kursojn. Pluraj sugestoj por la venonta laboro interŝanĝiĝis. Rilate la monatkunvenojn oni proponis ke parto de ĉiu kunveno estu destinota al perfektiga kurso kun diversaj instruantoj laŭvice. Ankaŭ por la unua horo de tiuj kunvenoj oni menciis kelkajn valorajn sugestojn (parolata ĵurnalo, diskutvesperoj) tiel ke por la periodo post la libertempoj atendas nin interesaj vesperoj. Necesas tamen substreki ke por plene efektiviĝi la celatan taskon ni bezonos ĉies kunhelpon. Ĉiu do estu en Deurne la 16an de septembro! (la estraranoj kunvenos jam antaŭe en Mercatorstrato la 3/9/53)

St. De Weerd

=====
PROTOKOLO PRI LA ESTRARKUNVENO DE LA 3a DE SEPTEMBRO 1953a.
-----

La libertempa periodo sentigis sin ankoraŭ ĉe la estrarkunveno de la 3a de septembro: kelkaj estraranoj senkulpigis sin.

La ĉeestintoj priparolis la plian ellaboradon de la ĝenerala kunveno, la organizadon de kursoj kaj la varbadon de novaj interesigantoj. Ke ekzistas tiaj pravas la fakto ke sekve de la anonco en la N.A. bulteno K-do Bonte jam ricevis 2 mendojn por lernolibroj.

Pere de nia propagandilo "Esperanto wint veld" ni intencas propagandi ĉe sindikatestoj kaj ĉe la urbakonsilantaro.

Pri la propono de la en Antverpeno okazonta kongreso interŝanĝiĝis diversaj pripensoj.

=====
LA SEKVONTA INTERGRUPA KUNVENO OKAZOS EN WILRIJK, VENDREDON LA 16an DE OKTOBRO, JE LA 20a HORO, EN LA POPOLDOMO, HEISTRAAT 6 K-do Van Eynde prezentos filmon: Tirolaj dancoj kaj muziko.

+++++



# INFORMILO

Interkontaktiilo por la Laborista Esperantistaro  
Antverpena. . . . .  
Redakcia adreso: Lamorinièrestraat 10 Antverpeno  
Numero 30 1953 Novembro

## ONA RIMEDO POR TROVI ESPERANTISTON! !

Vi skribas nederlandlingve al Valonio, al iu ajn fabriko-  
ejo. Kaj vi ricevas de alia organizo respondon Esperantlingve.  
Facile ĉu ne? . . . . Vi ne komprenas?? Ankaŭ ne mi! - Sed tion  
klarigas al mi nia k-ko Spitaels.

"Esperance".

Antaŭ kelkaj tagoj mi petis informojn nederlandlingve de iu  
valona fabrikejo de motocikloj en Charleroi. Kun sciivolo mi  
atendis la respondon: Ĉu ĝi estos nederland- aŭ franclingva?

La respondo venis tre rapide: "Al S-ro E. Spitaels"  
Ĉu mi bone vidas? Jes, el Charleroi. En Esperanto. Kun tre  
afabla leterco en nia lingvo oni klarigis ke la leterportisto  
eraris pro la faktoj ke ilia asocio regule ricevas abundan  
korespondadon el Flandrio, ke estas la sama domnumero, ke la  
nomo de ilia asocio "Espérance" iom similas kun la vorto  
"Esperanto" kio troviĝas sur niaj Natur-Amikoj-kovertoj,  
kiujn mi ĉiam uzas.

Jes, ne estas de mia fabrikejo. En la bela, pres-  
ita leterstampo mi povas legi: "Espérance" Union belge  
contre la poliomyélite. La adreso, kaj sube: Esperanto uzata.  
La frenda vorto signifas: "infana paralizo", la konata kaj  
timata malsano.

En la dankpoŝtkarto por ilia samideana helpo mi  
petis kelkajn informojn pri ilia Asocio.

Mi ricevis libreton kaj folion en flandra lingvo  
klariganta ke la celoj de la asocio estas:

- 1.- Batali kontraŭ la plago de infana paralizo.
- 2.- Doni ekipaĵon al la plej precipaj centroj de  
la lando, ekzistanta el ŝtalaj pulmoj kaj modernaj sanigiloj.
- 3.- Doni materialan helpon al bezonantaj personoj  
kiuj suferas je tiu malsano.
- 4.- Disvastigi la konon pri infana paralizo (per  
eldonaĵoj, paroladoj, dokumentado).

Ĉiu kiu interesas povas peti informojn al la  
adreso:

"Espérance" 72 Avenue de Waterloo Charleroi

P.S. La respondo de la valona fabrikejo estis franclingve.

E. Spitaels



PROTOKOLO PRI LA GENERALA KUNVENO DE LA 16a DE SEPTEMBRO 1953a

EN DEURNE

Antaŭ malmultnombra ĉeestantaro la prezidanto malfermas la unuan postferian renkontiĝon de la antverpenaj grupoj kiuj preskaŭ ĉiuj estas reprezentatoj. Kun bedaŭro ni konstatas ke ekmalinteresiĝo sentigas sin inter la laborista esperantistaro.

K-do Bowoy demandas ĉu la ĉeestantoj opinias ke nia maniero de kunlaboro, nome la ĉiumonata renkontiĝo en ĝenerala kunveno, taŭgas aŭ ĉu tiuj kunvenoj estus kaŭzo de disfalo ĉar ekstimigante la malpli kapablajn. Tio ne estas veteŝajna; la ĉiunaj vesperoj obligas al la interesigantoj aŭskulti duhoran esperanlingvan konversacion, sed mem partopreni ĝin, kio estas plej efika por alkutimiĝi al la uzo de nia lingvo.

K-do Somers rimarkigas ke lia opinio la NA-FLE dilemo komete bremsas la partoprenon al la esperantista vivo. Povas esti ke tia bedaŭrinda stato malfavoras la intereson sed oni pripensas ke ni nur deziras ke tiuj kiuj lernas Esperanton ĉeestante niajn kunvenojn, pli konatigu kun la lingvo kaj la movado por ke ili konvinkigu pri ĝia taŭgeco kaj la neceso de ĝia disvestigo.

Pluraj gekamaradoj raportas pri siaj libertempoj kaj pli speciale protokolas la eventojn de esperantista interkontakto. Unu rakontas pri sia restado en germana NA-domo, gvidate de SAT-ana "patro"; dua pri persona konatiĝo kun korespondanto kaj malsukcesa provo de renkontiĝo kua sie sveda kamarado vojaĝanta de Zagreb al lia lando; tria pri la vojaĝo de la hobokenaj gekamaradoj al Innsbrück, pri rondveturado de danaĵ konatuloj en Belgio, pri germanaj esperantistoj en brusela ekspozicio; alia pri sia vojaĝo al Konstanco kaj partopreno tie al la Internacia Ferie-Semajno kun ĝiaj Ĉseh-kurso kaj ekskursoj; ankoraŭ alia pri travivaĵoj survoje al la SAT-kongreso. Certe tiuj kamaradoj spertis la valoron de Esperanto.

St. De Weerd.

EN NE BUBE TU SKRIBE .

Ne ĉiu persono troviĝas en favoraj cirkonstancoj por partopreni ĉiun kurson. Ofte ni konstatas en nia propaganda agado, ke interesigantoj ne povas aligi al sekcio kurso ĉar la fiksitaj tagoj ne kontenas al ili, ĉar oni havas neregulan ĉeĵoron aŭ alia-ŝatre vespere estas ĉiupite, kaj pri tio kontraŭvole devas rezigni.

Tiaj personoj ne perdiĝu por nia movado! Se inter viaj konatoj troviĝas tiaj interesigantoj, bonvolu sendi al ni ĉiujn nomojn kaj adresojn, kaj ni informos ilin pri la kondiĉoj de la skriboj kursoj por komencantoj. Anticipe ni dankas vin.

Krom tio, se vi mem intencas partopreni kurson por unu el la 3 ekzamenoj: Elementa, Meza, Supera, kaj se ne ekzistas por tio en via sekcio konvena okazo, informu nin kaj ni navigos al vi prospekton pri la kondiĉoj de niaj kursoj por ĉi tiuj diplomoj.

Direktu vin al : INSTRUA SERVO F.L.E.  
Heemstedestraat 44 Amsterdam W.

LA SEKVONTA INTERGRUPA KUNVENO OKAZOS EN ANTVERPEN, MERKREDON LA 18an DE NOVEMBRO, JE LA 20a HORO, FRANKRIJKLEI 39

ATTENTU :

La 29an de Novembro, ni vizitos la lokaloj de la P.T.T. en la Jezusstraat.

Ni kurvenos dimanĉmatene je la 10a, je la angulo de la Jezus- kaj la ...  
VI ĈIuj ESTAS ... PATAJ ,